



K 29

Marto 1979

Kvaronjara eldono



Lepora

Supo

El "Rakontoj pri Afanti"
(legu paĝon 2)

Lepora Supo .

Iutage, amiko de Afanti revenis de ĉasado kaj donacis al li unu leporon. Afanti tre ĝojis kaj regalis la amikon per la leporaĵo.

Post malpli ol unu semajno, la ĉasisto denove venis al Afanti, kaj ekfrapis je la pordo.

"Kiu?" demandis Afanti.

"Estas mi, via amiko, kiu donacis al vi leporon!", respondis la ĉasisto.

Afanti regalis tiun amikon per lepora supo.

Post unu semajno kvin-ses homoj interkonsiliĝis: "Ni iru al Afanti por konatiĝi kun li" Kaj ili vizitis. Afanti.

"Kiu estas vi?" demandis Afanti.

"Ni estas amikoj de via amiko, kiu donacis al vi leporon".

"Ho, bone, bone!"

Afanti regalis ilin per teo.

Post plia semajno, venis al Afanti ok-naŭ personoj. Li demandis, kiuj estas ili.


"Ni estas amikoj de la amikoj de la ĉasisto, kiu donacis al vi leporon."

"Bonvenon, bonvenon," diris ĝentile Afanti.

Post kiam Afanti petis ilin enveni la domon, li prezentis al ili po tason da kotakvo.

"Kio estas tio? Ĉu trinkebla? mire demandis la gastoj.

"Tio ja," diris Afanti, "estas la supo de la supo de la supo farita el la leporo, kiun al mi donacis mia amiko."



Solvo
sur
paĝo
15

PIRAMIDO

Ĉiu vorto enhavas la literojn de la lasta vorto kaj unu novan literon.

Indikoj:

1. La 19-a litero de la alfabeto
2. Nederfina pronomo
3. Supernatura estaĵo
4. Pensaĵo
5. Speciala nutromaniero
6. Legforta ordono de reĝnestro
7. Konfido, kiun ĝuas prunteprenanto

Colin Quayle

Se


Se mi estus malgranda
malgranda eta knabo
mi rajdus ĉiutage
sur granda papili'
kaj sub la sunradi'
ekflugus mi felica:

AVE FELIĈUS MI!

Se mi estus malgranda
knabin' ete malgranda
vojaĝus mi rajdante
sur brila papili'
trans nia kontinento
per plejfavora vento,
ĝis lando Japani'!

KORME FELIĈUS MI!

Se...



AMUZIĜU pri NOMOJ

Ĉu vi memoras niajn antaŭajn amikojn - Petro Selo la legomisto, Mario Neto la aktorino, Eriko Ameriko la Usonano, kaj Karolo Barkarolo la gondolisto ?

Mi volas prezenti al vi kelkajn novajn amikojn.

Unue, Omaro. Sed ne salutu lin per manpremo. Li ne estas Omaro Kajamo. Li estas Omaro la Omaro kaj li forte pinĉas.

Flora kaj Floriana estas hortikulturistoj, same kiel Viola kaj Violeta; kaj Oktavo kaj Oktavia kompreneble estas ambaŭ muzikistoj.

Nia juna hungara amiko, Kolomano ja posedas ankaŭ bruston, krurojn kaj ceteron, kaj la bela Reĝina, malgraŭ sia nomo, ne estas reĝino.

Finfine mi petas: renkontu du knabojn, kiuj ĉiam argumentadas pri vortoj, Simono Sinonimo kaj Antonio Antonimo.

Per ili finiĝas la prezentado.

E.L.


Ludmila Jevsejova.

Kuraĝa Ansero.





Ga -ga! diras la ansero.
Kvankam vintras sur la tero,
Mi sen botoj lagon iras,
Ĉiu knabo min admiras:

- Tiu birdo - sensacio !

Nudpiede sur glacio...



ĈU-as,
.....-is,
.....-os ?



J Mikulaŝ
(solvo sur paĝo 15)

ĵ ĵ

Marto 1979

1

8



Morsa kodo;

15

22

29

ĵ . - - - .



La nomojn de la aĵoj vi trovos sur


paĝo 15.

Bele kolorigu ĉiujn ĉu ne?

K k

Morsa kodo;

K - - -



La Fiŝo, kiu grimpas sur arbojn.

Kiel oni scias, plej multaj fiŝoj ne povas vivi sen akvo. Fakte, oni ofte diras pri personoj, kiuj estas ekster sia kutima ĉirkaŭaĵo, ke ili estas kiel -- "fiŝo ekster akvo". Se fiŝo estas metita ekster sian naturan elementon, ĝi spasma-spiras dum ioma tempo kaj baldaŭ mortas, ĉar tuj, kiam ĝiaj brankoj ne plu estas malsekaj, ĝi ne povas spiri.

Sed ekzistas iu stranga fiŝo (Anabas scandens), kiu ofte forlasas la akvon kaj fakte surgrimpas la ĉe-bordajn palmojn. Tiu ĉirimpanta Perko' vivas en Cejlono kaj Hindujo.

Ĝi ĉiam havas bonan kaŭzon por foriri el sia akva hejmo; ĝi pensas pri vagado nur, se ĝi timas, ke sekco minacas - ke lageto aŭ rivero kie ĝi kuŝas, povos sekiĝi. Ĉar ĝi ne volas surgrundiĝi, ĝi komencas serĉi pli profundan lageton aŭ riveron. Ĝi posedas dornajn naĝilojn, kiuj ebligas al ĝi, 'iri' trans la grundo serĉante novan hejmon.

Kial tiu perko ne mortas samkiel alia fiŝo, kiu troviĝas ekstere de akvo? La respondo estas, ke ĉe ambaŭ flankoj de sia kapo ĝi havas specon de provizejo, en kiu ĝi povas amasigi provizon de akvo; tiu tenas ĝiajn brankojn malsekaj kaj donas al ĝi ŝancon spiri, ĝis kiam ĝi atingos la sekurecon de alia akvujo.

Eble daŭros longtempe, ĝis kiam la perko trovos tian lageton. Se tio okazas, la saĝa eta fiŝo scias, ke ofte oni povas trovi akvon en la kavetoj ĉe la palmaĵoj petioloj. Jen ĝia lasta espero! Do, se ĝia provizo de akvo preskaŭ nuliĝis, ĝi komencas grimpi sur arbon: ĝi alkroĉas sin al la arbo-ŝelo per siaj blanko-kovriloj kaj uzas siajn dornajn naĝilojn kiel grimpilojn.

La vojaĝo estas tre malrapida, sed ofte ĝi finfine atingas sian celon kioese kaj trovas la karegan akvon, kiu por ĝi signifas novan vivadon.

P.E.Schwerin

El "The Australian Esperantist" no 159(239)

NI VERKAS -- Ĉu vi jam verkis ion? Aŭ ĉu vi verkos ion?

Sendu vian verkaĵon al Andre Gimbert, 10 Impasse Ayguepasse.
F-19100 BRIVE, Francio.

TABURETO por la domo de la pupoj.

Bezonataj - alumetskatolo kaj pluraj alumetoj (lignaj sen la kapoj)) kaj iom da remburajo.

Per akra tranĉilo duonigu plurajn stangetojn.

Forigu la kovrilon de la skatolo.

Gluu unu netranĉitan alumeton sur la flankon de la skatolo ĉe la angulo.

Tiam algluu la duonstangetojn sur la flankon ĝis la sekventa angulo. Tie gluu alian netranĉitan stangeton. I


Faru la samon ĉirkaŭ la skatolo.

Por prepari la supran parton uzu pecon de la skatola kovrilo sen flankoj kaj bazo.

Ŝmiru iom da gluaĵo sur unu flankon de tiu peco kaj aldonu iom da remburajo. II

Uzu pecon de materialo aŭ tapeto por kovri la tuton kaj faldi malantaŭen. Gluu la malsuprajn faldojn. III

Tiam fiksu la supran pecon sur la malsupron per gluado de la suproj de la alumetoj. IV




Lumila Jevsejeva

Zoo - studo .

Supre kaj malsupre - plado,
tute ronda, kiel rado;
laŭ la sabla voj' moviĝas,
kap', piedoj videbliĝas.

Tute simpla zoo-studo
temas, knaboj, pri ?.....

-- Testudo !



POEZIA BUKEDO POR GEKNABOJ DE LA MONDO Bertram Potts
Eldonita de AMO-AKADEMIO, Kamisidami, Morijama, NAGOJA Japanio.
Prezo; 1000 erpĵ; 10nedgld.; plus 25% afranko.

Verre rekomendinda estas ĉi tiu kolekto de poemoj originale verkitaĵoj en Esperanto por infanoj. La temoj - koboldoj, anasoj, ludoj en la kamparo - estos konataj al ĉiuj legantoj pere de la nacilingvaj versaĵoj. Tamen s-ro Potts tiel sprite kaj freŝe traktas la temojn, ke vi certe ĝuos ilin denove. Post kelkfoja legado de la poemoj vi eĉ trovos, ke vi scias ilin parkere, tiel facilaj kaj allogaj estas la ritmoj.

Bele ilustrita, ankaŭ kolore.

M.B.

Porinfana literaturo ĉe Belartaj Konkursoj.

Okaze de la Internacia Jaro de la Infano, Belartaj Konkursoj dediĉos apartan branĉon al la literaturo porinfana. Povas temi pri diversspecaj literaturaĵoj (fabeloj, noveloj, poemo, kanto, drameto), laŭ la teknikaj normoj de la responda "plenaĝula" branĉo de BK. Oni sendu ĉiujn konkursaĵojn en kvar ekzempleroj al la sekretario de BK, s-ro Alec Venture, 7 Grosvenor Road, Wallington, Surrey TW20 0EG Britujo. Ĉiuj verkoj devos lin atingi ĝis la 31a de marto 1979.

17a Infankongreseto UEA en Luzern, Svisio. 28 Julio - 4 Aug. 1979.

50 infanoj 6-13 jaraj povos partopreni - nepre necesa estas suficia lingvoscio. Loĝado kaj manĝado en moderna, ĵus inaŭgurita Junulargastejo. Individua kosto por loĝado, manĝaĵoj, prizorgado, asekuro kaj ekskursoj - 180 sfr. ; por gefratoj partoprenantaj po 160sfr.; por lernejana grupo po 160sfr..

Lindato por aliĝo 31a de marto 1979. Esperanto pf 14, 6512, Giubiasco, Svisio.

SAT Infankongreseto en Swanwick, Derbyshire, Britio Julio 13-20, 1979
Kosto por loĝado, manĝaĵoj kaj du ekskursoj - 3-10 jaraj po £27.
1½ - 3 jaraj £18. Pli ol 10 jaraj kiel plenaĝuloj - £36.

SOLVOJ

de paĝo 3:

I⁰O
D I O
I D E O
D I E T O
E D I K T O
K R E D I T O

de paĝo 7 saltos paroladis eniris ludas
 kaptos legos vendas skribis
 vojaĝos laboris.

de paĝo 8 Ĵ Ĵaŭdoj Ĵetlanco Ĵonko Ĵetkubo
 Ĵurnalo Ĵinrikŝo
 K Klaŭno Kokino Karoto Kandelo
 Kvadrato Katido Kuniklo.

de paĝo 10 Jen kelkaj el la vortoj kunmetebaj:
 belo, bele, ĉambro, ĉambristino, kuirejo,
 dormo, dormejo, laboro, laborilo, laboristo,
 instruo, instrue, arbaro.....

=====

El UN kaj NI n-ro 11

... Unesco jam de longe planas elsendi televidajn programojn per satelitoj al evoluantaj landoj por eduka celo. En kiu(j) Lingvo(j) ? Se tia televida programo enhavus kurson pri Esperanto, post unu aŭ du generacioj la ter-anoj komprenos unu la alian sen komunika problemoj kaj kun supernacia koncepto.....

ADMINISTRACIO de KALAJDŬKOPO S.A.T. Gazeto por Geknaboj

Redaktorino: Ethel Prent.

29 Farrance Road, Chadwell Heath, Essex, RM6 6EB, Anglio.

Telefona Numero: 01-597 1347 (ne uzu 01 se vi estas en Londono)

La jarabono por kvar eldonoj post ricevo de pago £0,75

Transpago de mono Bonvolu pagi per poŝtofaceja ĝiro se tio eblas el via lando al W.E.M. konto 35 411 0004 (sama adreso).

Nepagipovaj landoj. Kelkaj geamikoj donacas abonojn por infanoj kaj geinstruistoj en tiuj landoj. Ni petas la ricevantojn de tiuj donacitaj abonoj, ke ili sendu poŝtkarton iam dum ĉiu jaro.

Por kvantaj menĝoj. Por 10 aŭ pli da unu eldono al unu adreso ni ofertas rabaton inter 10% kaj 20%.

Perantoj - En diversaj landoj estas SAT-perantoj kaj tiuj transpagos por vi la abonojn pere de SAT, Parizo. Petu informon pri peranto en via lando de ni aŭ de SAT-Centro, 67 avenue Gambetta, Paris 75020, Francio, kiu volonte transpagos viajn abonojn.

Same U E A, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam NL-3015 BJ, Nederlando transpagos viajn abonojn al ni.

=====

LA REDAKCIO

bonvenigas verkojn kaj desegnojn de spertaj esperantistoj - ludojn, poemojn, ŝercojn, rakontojn, kiuj taŭgas por infanoj.

Dankn al ĉiuj, kiuj jam kunlaboris.

NI VERKAS -

La REDAKTORO de "Ni Verkas" bonvenigas verkaĵojn

de infanoj - sendu ilin al Andre Gimbert
10 Impasse Ayguepasse,
F-19100, BRIVE,
Francio.